



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 210

Oktobro 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



La Uragano

Je dimanĉo, la 29a de septembro (2003), la anoj de la Esperanto-Rondo de la Halifaksa regiono partoprenis en librofoiro sur unu el la kajoj ĉe la haveno. Mi loj da homoj de NovSkotio vizitis la foiron, kie troviĝis budoj de librovendistoj, eldonistoj, bibliotekoj, organizaĵoj kontraŭ analfabeteco, ktp. Aŭtoroj legis el siaj verkoj kaj prelegis pri sia laboro kaj instruistoj legis al infanoj. La Esperantistoj prizorgis budon kie oni povis vidi librojn el la Libraro Ludovika, bildkartojn, fotojn, kaj afiŝojn. La samideanoj disdonis centojn da faldfolioj, klarigojn pri la lingvo kaj ties celoj, pri gramatiko, pri la poŝta kurso, eĉ pri kiel mendi bieron per 26 lingvoj. Kiam ajn scivolema vizitanto haltis antaŭ la budo, Esperantistoj estis tie por respondi al demandoj kaj instigi intereson pri nia bela lingvo. Je la fino de la tago oni taksis, ke kaj la librofoiro kaj la Esperanto-budo sukcesoplene floris.

Tamen, dum la tuta tago la homoj en nia parto de NovSkotio konsciis, ke uragano “Juan” estis survoje al nia marbordo. En la atlantika regiono de NordAmeriko uraganoj naskiĝas en la maro en tropikaj latitudoj kaj vojaĝas norden. Ofte ili estas nekredeble detruantaj kiam ili frapas la insulojn de la Kariba maro kaj la Ŝtaton Florido kaj aliajn ŝtatojn ĉe la atlantika marbordo de suda Usono. Kutime ili perdas la teruran povon kiam ili transiras teron aŭ atingas la nordan Atlantikon. Sed laŭ la prognozo, ĉi tiu uragano celis rekte al Nov-Skotio kaj surteriĝos nur kelkajn kilometrojn de Halifakso. Sed kion fari? Ne multon, krom endomigi kelkajn objektojn, sekure fermi la fenestrojn, kaj atendi esperante.



Estis preskaŭ noktomezo kiam komenciĝis la pluvo kaj vento. Oni povis vidi per la televido ke estis inundo ĉe la haveno pro tio, ke la tajdo estis tiam alta. Oni montris damaĝon al arboj kaj konstruaĵoj. Elektro kaj televido komencis malŝalti kaj reŝalti. Subite estis mallumo en la tuta urbo. Restis nur pluvo kaj vento kaj bruoj. Oni povis aŭdi kraksonojn kiam rompiĝis kaj frakasiĝis branĉoj kaj arboj, sed ofte oni ne povis scii la fonton de la sonoj. Oni sentis la skuigon de la domo. Estis nenio por fari krom atendi la finon de la terura ŝtormo. La vento atingis la maksimumon je la unua horo post noktomezo, kaj post du-tri horoj la ventego pasis. Nun la homoj povis dormi, sed kelkaj aŭskultis la bateriaparatojn por kapti la nekonstantan radiodissendadon de nekompleta informo.

En la mateno ni eliris el la domoj por vidi kio okazis al ni. Multaj arboj ankoraŭ staris, sed ankaŭ multaj estis detruitaj. Arbotrunkoj kaj branĉoj estis rompitaĵoj. Multaj arboj estis sur la tero pro tio, ke la vento puŝis ilin ĝis la radikoj povis ne plu kaptoteni la maldikan tavolon de la tero. Jen kaj jen konstruaĵo aŭ aŭtomobilo estis damaĝita.

Almenaŭ du homoj mortis pro la vento. Unu estis juna ambulancisto, dum la deĵoro por savi vivojn, frapita de arbobranĉo.

Alia mortis kiam falanta arbo falis sur sian aŭtomobilon. Nur kelkaj konstruaĵoj estas grave damaĝitaj. Parteto de kvaretaĝa konstruaĵo krevis, sed tri homoj kaptitaj en la restaĵo estis savitaj. Multaj ne havis telefonservon. Preskaŭ neniu havis elektron. Oni diris ke, ĉe la marbordo, ŝipetoj kaj boatoj troviĝis sur la tero aŭ sub la akvo. Laŭ raportoj, fiŝkaptistoj kaj farmbienistoj perdis multon.



La detruo estis pli ol oni anticipis. Laŭ diversaj raportoj, la plej fortaj ventoblovoj atingis inter 140 kaj 180 kilometrojn en horo. 100,000 domoj en la halifaksa regiono estis sen elektro, kelkaj en la kamparo eĉ sen akvo. Centoj da skipoj laboris por malplenigi la stratojn de arboj kaj branĉoj kaj restaŭri la elektran sistemon. Eĉ la armeo venis por helpi. Grava problemo estis la falintaj elektrodratoj. En la unuaj tagoj butikoj kaj benzinstacioj ne funkciis pro manko de elektro. La lernejoj kaj multaj publikaj servoj restis fermaj dum tuta semajno. Ĉie oni aŭdis la sonojn de ĉensegiloj dum laboristoj kaj civitanoj de Halifakso strebis refunkciigi la urbon.

RAPORTOJ DE UNUOPULOJ (iomete mallongigitaj):

Kim Raportis:

En nia kampara dometo, kiu situas proksimume 65 kilometrojn for de Halifakso, mi enlitiĝis ĉirkaŭ la deka kaj duono. Kvankam oni avertis nin dum kelkaj tagoj, ke tiun nokton la uragano frapus nian provincon, mi vere ne multe maltrankviliĝis ĉar multfoje oni troigas la veter-prognozojn. Tamen, post noktomezo mi, kiu ĉiam tre bone dormas, vekigis pro laŭtaj, strangaj bruoj. Mi neniam antaŭe aŭdis tiajn bruojn kaj mi timis ke la ventego forblovus la ŝindojn de sur la domo. Mi rigardis eksteren kaj vidis malmulton, ĉar pluvis kaj mallumo regis la nokton. Mia samdomulino Connie kaj nia hundeto Loki jam maldormis dum longa tempo, kaj ili ambaŭ timis la uraganon. Ĉi-foje, mi sciis ke oni vere ne troigas la veterprognozon.

Ni sciis ke ni povis fari nenion krom preĝi, ĉar la forto de Naturo estas pli ol tiu de homoj. Tiam mi rimarkis, ke la domo ne havas elektron. Estis stranga sento – en la domo estis manko de la kutimaj dombruetoj, sed ekster la domo ekventoj faris neordinarajn timigajn, akrajn bruojn. Finfine la ventego grade mildiĝis kaj, post eble tri horoj, mi decidis denove enlitiĝi kaj baldaŭ endormiĝis.

Matene mi ellitiĝis kaj iris eksteren. Je mia surprizo, ĉiuj ŝindoj ankoraŭ restis sur la muroj kaj tegmentoj de la domo kaj farmtenejoj, sed kelkaj branĉoj restis sur la tero, rompitaĵoj de sur la arboj pro la ventego. Kvar fostoĵoj kaj barilpordeto restis sur la tero kaj kelkaj aliaj fostoĵoj kliniĝis. Vere ni estis bonŝancaj kompare kun multaj aliaj loĝantoj en nia regiono. Multaj arboj falis, ne nur en la arbaroj sed sur la elektrodratoj, ŝoseoj, kaj konstruaĵoj de la kamparanoj kaj farmistoj. Estis multe de detruo de grandaj farmtenejoj. Pro tio, kelkaj farmistoj perdis preskaŭ ĉion.



Dum sep tagoj ni estis sen elektro, tamen en la subteretaĝo ni havas kranon por la cisterno, do ne mankis al ni akvo por la domo kaj nia puto libere fluigis trinkakvon en nian domon pere de speciala krano kiu ankaŭ situas en la subteretaĝo. En kamparaj regionoj oni havas elektrajn pumpilojn, do mankas akvo kiam oni ne havas elektron. Ni kovris la frostigilon per litkovriloj kaj dormosakoj por konservi la malvarmecon - kaj la manĝaĵojn - ene. Plejparte, la vetero estis suna kaj varma, do ni povis kuiri sur la antaŭporĉo. Nia fornego brulas lignon aŭ oleon sed ni devis utiligi ĝin nur unufoje - dimanĉon kiam mia frato venis kun la generatoro - ĉar tiu tago pluvis kaj la domo iĝis malvarmeta.

La kuiradon ni faris per primuso. Kelkaj bonkoraj najbaroj donis al ni kvar propanajn cilindrojn (tiam ni havis rezerve nur unun), do ni havis sufiĉajn por boligi akvon kaj kuiri simplajn manĝojn dum la senelektra semajno. Kompreneble

ni lavis nin en malvarma akvo kaj ne povis bani nin dum tiu periodo. La vesperoj estas tedaj ĉar ni havis nur poŝlampojn, kandelojn, kaj kerosenajn lampojn kiuj ne ĵetis multe da lumo por legi aŭ skribi. Tamen ni havis pil-radion kaj povis aŭskulti la dissendadojn de lokaj kaj malproksimaj stacioj. Ankaŭ nia telefono sufiĉe bone funkciis kaj ni malkonektiĝis nur kelkajn horojn dum tiu tuta periodo.

Multaj parencoj kaj geamikoj telefonvokis nin por certiĝi, ke ni estas sekuraj. Mia frato, kiu loĝas oriente de Halifakso, sabate aĉetis generatoron ekster la urbo. Dimanĉon, li portis ĝin al nia domo frue kaj konektis ĝin al la fridujo kaj frostigilo, do lia ago savis multe de la manĝaĵoj en la frostigilo, sed la viandon ni devis forĵeti. Eble du-tri horojn post lia reveno hejmen, oni redonis al ni la elektron. Kelkfoje dum la postaj du tagoj ni perdis la elektron dum mallongaj periodoj, sed ni ne tro plendis ĉar la laboro farita de la elektra kompanio estis grandega. Mi esperas ke alian viziton de uragano ni neniam ricevos.

Mariĵo Raportis:

Mi ne sukcesis endormiĝi ĝis proksimume la dua matene, pro la bruo de la vento kaj pluvo kontraŭ la fenestroj. Mi dormis nur proksimume tri horojn, ĉar Gene kaj mi devis leviĝi je la kvina por trafi aŭtobuson je la oka al Berwick. Ni leviĝis kaj ni vestis nin en preskaŭ mallumo, uzante nur poŝlampojn ĉar la elektro mankis ek de proksimume kvaronhoro antaŭ meznokto. Per la radio ni aŭdis, ke la urbestro petis, ke ĉiu kiu ne laboras en io esenca dum la krizo devus resti ĉe-hejme, kaj ke multaj vojoj estis blokita de faligitaj arboj. Ni devis iri al Berwick por la inspektado de ruldomo per inĝeniero. Ni decidis, ke ni probable ne sukcesus tien alveni pro blokita vojoj, kaj ke oni ne bone povas inspekti domon senelektran. Ni telefonis la inspektiston kaj prokrastis la inspektadon.

Mi pensis ke mi vidas lumon horizonte, kaj decidis marŝi por vidi ĉu la elektro funkciis tie. Mi iom marŝis kun poŝlampo-lumo, sed la horizonto iĝis pli malluma. Mi returnis hejmen, reenlitiĝis (nun, preskaŭ la sepa matene), kaj malfrue dormis.

Post vekiĝo Gene kaj mi decidis iri al la mia por manĝi glaciaĵon – por matenmanĝo – antaŭ ol ĝi tro fandiĝus. Poste, ni iom marŝis por rigardi la uraganan detruon. Estis preskaŭ neniom da damaĝo.



Tamen, estis unu arbo kiu rompiĝis – parto falis sur elektrajn kablojn, kaj la alia parto malantaŭen falis, frakasante ŝtuparon kaj balkonon de senhoma domo. Alie, strato de ruldomoj estis blokita per tio, kion ni pensis esti tuta ruldomo ruinita; sed ni malpravis: ĝi estis tegmento de apartamenta konstruaĵo el la apuda strato. La tegmento estis blovita super la ruldomojn kaj falis en la straton, nur iom damaĝante du ruldomojn. Neniu vundiĝis.

Tiun tagon mi enlitiĝis tre frue, ĉar legado malfacilas per kandellumo. La postan tagon, mardon, mi iom helpis ĉi tie kaj tie, kie ajn mi vidis personojn kiuj bezonis helpon. Poste, mi biciklis al la urbocentro. Ĵus antaŭ ol foriri, mi aŭdis iun en la alia flanko de la strato krianta, "Mi havas elektron!" Mi kontrolis, kaj ankaŭ mi havis. Mi haltis ĉe la komunuma konstruaĵo, pensante ke eble estus tie organizantoj de volontuloj, sed ĝi estis fermita. Mi rimarkis ke granda manĝo-butiko estis fermita, kaj dungitoj forĵetis manĝaĵojn en rubujegon. Nur kiam mi veturis pli proksime al la urbocentro, mi komencis vidi pli grandan atestaĵon de la povo de la ŝtormo: grandaj arboj estis falintaj ĉie. Mi biciklis ĝis la Publikaj Ĝardenoj, kaj ĉirkaŭrondis ilin, rimarkante la grandan nombron de falintaj arboj, tri aŭ kvar el ili disfalis la barilon; unu el tiuj estis vera giganto kiu baris la tutan larĝon de larĝa trotuaro, en Summer Strato.



Mia fridujo estas nova, aĉetita pasintjare, kaj mi preskaŭ ne malfermis ĝin dum la neelektrumo. La enhavoj de la frostigilo daŭre estis frostaj. Mi bakis pudington kun la plej malnova lakto, kaj varmigis ĝis bolado la pli novan. Vendrede, mi manĝaĉetadis kiel kutime. Krom tio, mi multe aŭskultis radion, per bateria radio ĉe Gene, aŭ per sunpova radio ĉe mi.

Kaj tiel estis la uragano por mi. Ĝuiga kaj interesa. Mi estis multe pli bonŝanca ol multaj aliaj. Eĉ sen elektro mi daŭre havis varman akvon, malvarman akvon, kaj la kloako funkciis. Mi havis sufiĉe da manĝaĵo. Nek domo nek io alia damaĝiĝis. Kaj la senlumeco daŭris malpli ol du tagojn.

Gene Raportis:

Ĝis nun, la nura uragano en mia vivosperto estis Betsy, kiu vizitis Puerto-Rikon la 5-an de aŭgusto 1956, kiam mi havis 14 jarojn. Tiutage mi portis mian ludilan spaco-kaskon por ŝirmi min kontraŭ la pluvego dum mi helpis mian patron najli tabulon kontraŭ malferma fenestro en nia domo. Poste mi faris fotojn de kelkaj faligitaj arboj.

Salto antaŭen al 2003, kaj jen alvenas Uragano Juan al nia ne-ŝtormema norda loko, Nov-Skotio. Antaŭ nun, la plej grava katastrofo en Halifakso estis la fama eksplodego de 1917, la plej-granda hom-farita eksplodo antaŭ Hiroŝimo. (La 6-an de decembro 1917, du ŝipoj, unu ŝarĝita de pafmuniciaro, koliziis kaj bruliĝis kaj bum! frakasis la urbon, mortigis ĉirkaŭ 1900 homojn.) Ĵurnalistoj diras, ke neniu ŝtormo en Nov-Skotio ekde la jaro 1893 komparas al Juan. Dankoplene, Juan nur mortigis kvin homojn; sed ĝi faligis centojn da miloj da arboj, inkluzive de 50,000 el 100,000 en la fiere rigardata Pinto-Plaĉa Parko de Halifakso. Ĝi ankaŭ rubigis multajn farmbienojn, fiŝ-boatojn, dokojn ktp, kaj sennombrajn mejlojn da elektrodratoj.

Tutcerte tial, la elektro malaperis por ĉirkaŭ 300,000 uzantoj – kaj ne ekzistis por kelkaj miloj da uzantoj eĉ dum 11 tagoj post la ŝtormo. Mi estis inter la bonŝanculoj: mia elektro revenis post manko de nur 40 horoj, ĝustatempe por savi la enhavon de mia fridujo. Mi tuj kuiris ĉion.

Tiurilate, ia amuza/malfeliĉa flankaspekto: lastatempe, mi aŭskultis BBC-an raporton pri Uragano Isabel, kiu ankaŭ detruis arbojn kaj la elektron en suda Usono. La anoncisto devis ekspliki, verŝajne por la ne-Usona aŭdantaro, ke en Usono [kaj Kanado], oni „pendigas dratojn sur fostoj kiuj estas super la tero kaj, tiel, senŝirmaj al la vetero kaj falantaj arboj.” En lia buŝo, la afero ŝajnis tre stranga, kaj ja ĝi estas. Parenteze, Mariĵo menciis ke en Kanado ŝi unue aŭdis avertojn pri flugado de kajtoj proksime al elektro-dratoj. En ŝia naskiĝ-lando, Portugalio, ne estas tia danĝero.

Steĉjo Raportis:

En la mateno mi trovis, dank Dio, ke la domo estas sekura. Estis stranga sento vidi ĉie la malsupren puŝitajn kaj rompiĝintajn arbojn. Mi perdis kvin aŭ ses arbojn, du el kiuj estis grandaj. Unu el miaj arboj falis kaj damaĝis la aŭtomobilon kaj aŭtomobil-dometon de najbaro. Sen elektro dum kvar tagoj, mi devis uzi kandelojn kaj bateri-torĉojn por nokte vidi, antaŭ ol mi regajnis elektron. Mi eltrovis, ke oni bezonas almenaŭ kvar kandelojn por studi matematikon en la tenebro. Mi estis bonŝanca havi telefonon. Mi sukcesis restarigi du duonfalintajn arbojn kaj, per helpo de laboristo kun ĉensegilo, tranĉis ĉiujn falintajn arbojn kaj stakigis la ŝtupojn. Nun mi havas sufiĉe da brulligno por pluraj jaroj.

Bob Resumas:

Ankaŭ mi estas inter la bonŝanculoj. Ni perdis elektron dum malpli ol tago, kaj tial perdis malmulte da manĝaĵo. Mia domo restis nedamaĝita. Multaj arboj falis en la najbarejo kaj apuda arbareto, sed oni ne kapablos pritrakti la plejparton de ili en la parkoj ĝis venontjare. Mi memoros Juan kiel fortegan ŝtormon kun la plej timigaj sonoj de vento, kiujn mi iam ajn aŭdis. Dum la sekvantaj du monatoj jam aperis gazetoj kaj libroj kun okulfrapaj bildoj de la damaĝo. Oni ankoraŭ riparas damaĝitajn konstruaĵojn, sed la multaj ceteraj arboj kiuj falis en parkoj devas resti sub la neĝo ĝis la venonta jaro.

Ni multe dankas al La Kanada Dissendoservo (CBC) por la bildoj.

Noto de la redaktoro: Mi pardonpetas pro tio, ke ĉi tiu numero tiel malfrue aperas. La ŝuldo tute estas la mia.